

De la 10-a ĝis la 14-a de marto 2019 okazis en Prago la estrarkunsido (EsKu) de TEJO, kiun partoprenis la estraranoj Konstanze Schönfeld, Francesco Maurelli, Léon Kamenický kaj Tomas Stano. Estis invititaj kiel observantoj mi, kiel komisiito pri Landa kaj Faka Agado, Charlotte Scherping Larsson, komisiito pri Aktivula Trejnado, Yuro Jung (Unika), ĵus elektita komitatano Ĉ kaj rete Karina Oliveira, komisiito pri Edukado. Protokolis la kunsidojn Clément Baleyte, unu el la TEJO-volontuloj.

En la unua tago, ni pridiskutis la planojn por IJK Slovakio kaj pri la partopreno de TEJO en UK Finnlando. La LKK raportis pri la kunsido ĵus havita en Liptovský Mikuláš, kiun mi ĉeestis. Oni raportis pri la kongresejo, pri la sugestoj de bonaj kandidatoj por Partopreno IJK-n, kiujn fine la Estraro decidis subteni. Pri la programo, ni decidis kune proponi novajn trejnadojn, kiun mi taksis vere taŭgaj por enkonduki homojn kaj al la bona gvidado de TEJO-sekcioj kaj al plia alproksimiĝo de la kunlaboro inter TEJO kaj ili. Verdire, enkonduki homojn al tiu temo estas grave por minimumigi niajn diferencojn kiuj malfaciligas la bonan laboradon de kelkaj aktivuloj. Mi sugestis okazigi programeron kun la helpo de la komisiono pri Landa kaj Faka Agado kaj volontulis por esti unu el la helpantoj de TEJO-trejnistaro. Alitemaj trejnadoj same okazos, kun engaĝiĝo de aliaj spertaj homoj.

Miaflanke, kiel komisiito pri Landa kaj Faka Agado, mi raportis la ĝisnunajn rezultojn de la Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj (KODEJO), kiu havis tri fazojn: la unua temis pri ĝeneralaj demandoj, la dua pri merkatico kaj alekstera komunikado, kaj la tria pri financoj. Estas grave tamen diri, ke la kvara formularo, kiu tuŝas la temon pri projektoj, strategio kaj kunlaboro kun TEJO tre baldaŭ estos preta. La rezultoj ankoraŭ ne publikas, ĉar daŭre mankas la plenigado de kelkaj sekcioj. Mi tamen ĝojas anonci, ke miaj vickomisiitoj ĝis nun akceptitaj estas Albert Stalin Garrido (Azio), Goby Abyssinie Ahonon (Afriko), Lucas Barbosa da Silva (Ameriko). Indas informi, ke aliaj samkontinentanoj bonvenas por helpi la laboron de niaj vickomisiitoj aŭ por enoficiĝi pri aliaj kontinentoj. Espereble en aprilo estos jam publika raporto pri la stato de niaj sekcioj, kaj de tiam mi esperas, ke ni kunlabore prizorgos la ĉefajn defiojn kaj plibonigu la atingon de niaj sekcioj.

Pluraj novaj sugestoj ekaperis, ekzemple de la ebla partnereco inter Landa Agado kaj Eventa Servo. Mi ricevis la taskon prizorgi la ĝisdatigon de informoj de la paĝo pri Landa kaj Faka Agado en TEJO-retejo, afero pri kiu mi jam komencis trakti en la sekva punkto. Plue, mi taksas altvalora la kreadon de la Centra Reto de TEJO, kaj mi aparte dankas al la laboro de Mia Nordentoft, kiu elstare laboris por ĝi. Tuŝka, Mia kaj mi kune komencis labori por ke estontece la CR havos profilojn de sekcioj kaj profilojn de prezidantoj, kasistoj kaj ĝeneralaj sekretarioj, por plifaciligi la komunikadon internan, la raportojn kaj la kunlaboron inter la sekcioj mem kaj inter ili kun TEJO.

Mi ankaŭ oficiale akceptis roli kiel komisiito pri Juro, la ĵus kreita interesgrupo de TEJO, kiun mi jam komencis gvidi antaŭ kelkaj tagoj. Indas memorigi, ke eblas ankoraŭ aliĝi, kaj sufiĉas rekte skribi al mi kaj manifesti la interesiĝon, por ke tre baldaŭ ni havu belan teamon kaj pritraktu la plej gravajn jurajn bezonojn de TEJO. Mi jam skribis al ĉiuj aliĝintoj

kaj restadas en kontakto kun la Estraro, por ricevi la bezonatajn dokumentojn kaj komenci starigi la debaton.

Krom la kunsidoj, la ĉeestantoj ĝuis la malvarmajn lastajn vintrajn tagojn de Prago, kaj vizitis plurajn lokojn: la turon de Prago, ekzemple, kien ni iris por trarigardi la urbon el supre, kaj kelkajn restoraciojn -- unu el ili kun Esperanta menuo. Mi taksas la laboron de la ĉeestintoj vere grava: ĉiuj konscias pri niaj nunaj malfortoj, sed samtempe ĉiuj iel kontribuis/as por la starigo de niaj nunaj fortoj. Krom ege spertaj aktivuloj, ili estas talentaj kaj bonvenigaj je problemsolvado, teamkomunikado kaj retrokuproj. Mi sentis veran etoson eman por superi malfacilaĵojn kaj trapasi niajn eventualajn problemojn. Tio estas sendube la ŝlosilo kiu ebligas al ni malfermi la pordojn de nia laboro por videbligi nian agadon kaj kune pripensi solvojn por la venontaj defioj.

Dankon, Prago! Elkoran dankon, TEJO!